


**INTERNACIA  
PEDAGOGIA REVUO**

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

**Redaktoro:**

Jozefo Németh

**Vicedaktoro:**

Katalin Smidéliusz

**Kunlaborantoj:**

Boo Mee Kim-Lindblom

Jennifer Bishop

Viŝnja Brankoviĉ

Stefan MacGill

Blazio Vaha



## ENHAVO

Stefan MACGILL: <i>De kie niaj laborfortoj?</i> .....	1
Li WEILUN: <i>Instrua metodo de Esperanto en superaj lernejoj</i> .....	6
Blazio VAHA: <i>Fabelkomencoj klasikaj</i> .....	7
<i>El la landoj kaj sekcioj (AU, BE, GB, FI, FR, HU, TG, US)</i> .....	14
<i>Ellernu! Szilágyi kaj Szilvási</i> (recenzoj de Péter MURÁNYI).....	23
<i>Konferencaj aferoj</i> .....	25
<i>Kompletigaj informoj pri la programo</i> (Jennifer BISHOP).....	25
<i>Ekskurso-tago dum la Konferenco</i> (Višnja BRANKOVIĆ).....	26
<i>ILEI-raportoj</i> .....	31
<i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA</i> (Bill MAXEY).....	31
<i>Juna Amiko / Libroservo</i> (Stefan MACGILL).....	31
<i>Financa Raporto 2000, Financa Plano 2001</i> (Boo Mee KIM-LINDBLOM).....	33
<i>Por via notlibro (Viviga Vojaĝo)</i> .....	36

## ESTRARO DE LA LIGO

**Prezidanto:** Mauro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Università Roma Tre, Via Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio.  
Tel. (+39) 06 44 62 092 aŭ 06 49 57 805, fakso: (+39) 06 49385673.  
<m.latorre@uniroma3.it>; <http://lps.uniroma3.it>  
*Interlernejaj projektoj, komunikiloj, terminaro, reprezentado.*

**Vicprezidanto:** Stefan MacGill, Bethlen Gábor u. 2, HU-2030 Érd, Hungario.  
Tel. (+36 23) 364 198. <stefan.macgill@galamb.net>  
*Lerniloj, komunikiloj, eldona agado.*

**Sekretario:** Mariana Evlogieva, Drujhba-2, PK 18, BG-1582 Sofia, Bulgario.  
Tel. (359 2) 24-33-78. <intrpres@usa.net> aŭ <amuze@poboxes.com>  
<http://www.poboxes.com/amuze>; <http://www.webalias.com/amuze>  
*Membraro, sekcioj, komitato*

**Vicsekretario:** Jennifer Bishop, 39 Hill Street, Hawthorn, Victoria 3122, Aŭstralio. Tel. (+61 3) 9818 7358, fakso: (+61 3) 9905 3668.  
<esperanto@education.monash.edu.au>  
*Lernejoj, konferencoj, gimnazio.*

**Kasisto:** Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge.  
Tel. (+46 8) 777 4175, <boomee.kimlindblom@swipnet.se>

**Membro:** *La estrara loko vakas, kun respondeco pri lerneja kaj universitata agado.*

**Membro:** *La estrara loko vakas, kun respondeco pri instruista trejnado kaj scienca esplorado.*

## De kie niaj laborfortoj?

La jaro 2001 estos esence grava por ILEI. Fine, ni havas eblecon konferenci en sufiĉa abundo, kun reprezenta komitato kaj partopreno de la plimulto de la estraro. Tio malverŝajne ripetigis en 2002, kaj neniu scias kiam venontfoje ni ĝuos bonajn konferencajn kondiĉojn denove. Tiurilate, ni dependas je la decido de UEA pri ĝia kongresurbo. Kiam ĝi elektas landon kie ni malfortas, ni aŭ *iras* kaj deficitige malmultas (Aŭstralio) aŭ ni *restas* kaj malmultas (Israelo/Francio). Tiel, la estrara rotacio kolapsis dufoje tra lastaj tri jaroj kaj ni luktas de du jaroj kun persiste malkompleta estraro. La mezdeĵora demisio de nia sekretario aldonis la kameldors-rompigan baton, ĉar en ties manoj kuŝas la tasko kaj scio organizi estrarajn rekompletigojn. Ju pli da vakaj estraraj lokoj, des pli da ŝarĝo sur la restantoj, kaj tiom malpli ili havas tempon organizi novajn elektojn kaj enkonduki novajn estraranojn, komisiitojn aŭ eĉ laborpretajn helpemulojn. Tiu-maniere ni perdas la kapablon konstrui la laborfortajn solvojn, kiujn ni bezonas.

*Kelkaj konkretaj proponoj survoje al solvoj:*

1. En Kroatio ni nepre modifu la Statuton por forigi i.a. tiun rotacian elektadon de estraranoj.
2. En Kroatio ni nepre elektu plenan estraron, kun trijara mandato.
3. La tasko rekompletigi la estraron kaze de vaka loko apartenu al la elektokomisiono kaj la sekretario, pri tio aliaj estraranoj ne devu okupiĝi.
4. ILEI ekhavu urĝe kaj baldaŭ (antaŭ la fino de 2001? - rev' rev') propran oficanton/ oficiston prizorgi kaj protekti la bazan funkciadon de la Ligo.
5. ILEI konvinku la movadon pri la neceso investi en edukado kaj ĝi transformu sin por kapabli efike mast-rumi tiun investadon.
6. ILEI reprite siajn labormetodojn. Ĝi reviziu la uzadon de ret-mesaĝado kaj majstru la arton jungi la fortojn de profesiuloj kun bezonataj kapabloj sed limigita tempo.



## *Komentoj pri tiuj ses ideoj:*

### **1. For la rotacion!**

Tio estis proponita lastmomente en Voss de la statuta komisiono, sen la anticipa scio de la estraro kaj akceptita de la komitato kontraŭ la deziro de la estraro (mi mem forte pledis por ties malakcepto). El la postaj dek jaroj, ni abunde kaj regule konstatis kiom ni suferis pro ĝi, sen ĝui la pretenditajn avantaĝojn. Kontinueco mankegis, estraraj venoj kaj iroj aspektis kiel tumulto ĉe rotacia pordo de rabatvendejo. La malfacilo konstrui teaman koherecon kontribuis al demisioj. Neniu havis tempon enkonduki aŭ eĉ taŭge konatiĝi kun novaj estraranoj. Ekzemple, nur poste ni eksciis ke ni havis dum pli ol jaro estraranon kapabla starigi kaj evoluigi komputilajn hejmpaĝojn. Ekzemple, nia nova sekretario povis ricevi malmultan enkondukan gvidon – la antaŭulo jam foriris, aliaj estraranoj foje ne havis tempon, pli ofte ne havis la necesajn detalajn konojn. Ni devis komplete rekonstrui nian memroliston. Eĉ jaron post ŝia elekto, neniun estrarkunsido povis okazi; laŭ mia scio, neniun alian estrarano eĉ renkontis nian sekretarion dum pli ol du-minuta reciprok-

preterfluga interparolo en UK. Ni tra ok monatoj ne sukcesas eklaborigi helpanton pri Interkulturo, kvankam la laborpretulo kaj eĉ komenc-mono ekzistas. Nun ni provos denove. Tiu malbeninda rotacio prenas multan kulpon por tiuj ekzemploj, kaj pliaj similaj.

La plenumo de regulaj taskoj ĉiujare suferis ĉar estraranoj devis daŭre serĉi novajn estrarkandidatojn, kaj okupiĝi pri starigo de elektoj, foje poŝtaj, por kiu neniun adekvata proceduro estas difinita. Nur se niaj konferencoj komencos ege pli prosperi, ni evitos komitatkunsidojn senkvorumajn aŭ ege malrepresentajn (ĉu 13 komitatanoj vere reprezentu 750 membrojn?). En 2002 ni ne imagu povi ŝanĝi statuton, kaj eble eĉ ne alekti estraranojn. 2001 estas nia unika ebleco.

### **2. La deviga tri:**

Nehazarde, ni povos esti kvorumaj en Kroatio. 2001 estas elektojaro por UEA. Ĝi en ĉiu tria jaro elektas kongreslandon kie ĝia komitato certe povos esti kvoruma. Tiaj landoj tendencos esti tiaj, kie ILEI povos simile arigi dignan nombron da komitatanoj. Sekve la trijareco iĝas pragmatisme iom deviga por ILEI. Ŝatu tion aŭ ne, tio estas la

realeco. Ĉi-rilate, kiel en aliaj sferoj (ekzemple, eldonado, fikso de adekvataj membro-kotizoj) kie ILEI kaj aliaj fakaj asocioj sopirus memstare agadi, UEA ja estas la laŭdioma ducent-kilogramo gorilo en la verda ĝangalo, kiu okupas la centran ekologian niĉon, lasante nemulte da vivspaco al pli modestaj specioj. Almenaŭ ĉi-kampe, ni akceptu nian lokon en la ombro de UEA kaj konformigu niajn komitatajn kaj estrarajn elektojn al ĝia trijara ritmo. Tiel ni povas havi koheran teamon, kiu grandparte fizike kunestos en la elekto-momento, povos konatiĝi kaj komune difini siajn labor-terenojn kaj -metodojn, unufoje enkonduki sin en la taskoj, kaj poste dum du jaroj kaj naŭ monatoj, plenkore sen perturboj, interrompoj kaj malaperoj dediĉi sin al la laboro.

### **3. Elektokomisiono:**

La antaŭa komisiono efektive akceptis la taskon okazigi poŝtan voĉdonon por estrarano, sed post kaj kun multega ret-mesaĝado kun restintaj estraranoj. Por kaj praktikaj kaj etikaj kialoj, estraranoj ne miksiĝu en la mekanismoj de la voĉdonado. La elekto-komisiono preparu solidan teamon ĉiun trian jaron, kaj staru preta tuj, rapide kaj

akcepteble rekompleti la estraron se necese.

### **4. Oficanto:**

La suba pledado tedos tiujn el vi kun longaj memoroj. Vi jam aŭdis ĝin de mi plurfoje inter 1990 kaj 1992, antaŭ mia tiutempa retiriĝo. Dek jarojn poste, la neceso estas tiom pli brula. Ĉi tio ne estas demando nur por ILEI, sed por la tuta movado. Jen komunumo, kiu por sia pluvivo dependas tiom komplete je kreado de novaj parolantoj kaj uzantoj kaj kies gvida asocio proklamis la instruadon unu el siaj tri ĉefaj celoj. Estas profunde neimageble, ke tiu movado havas eĉ ne unu plentempan dungiton taskita labori por edukaj kaj instruaj celoj ie ajn en la mondo. ILEI simple ne povas en la tria jarmilo pretendi sin serioza monda organizo sen oficanto.

*Ne mankas taskoj pri kiu oficanto okupu sian tempon:*

- Prizorgi la rutinajn, administrajn, fakajn kaj varbajn flankojn de la konferenca pretigado kaj de instruistaj seminarioj, sub la gvido de la koncernaj estraranoj.



- Ekspedi, administri, stoki kaj varbi por *Juna amiko*. (vidu alvokojn en IPR 2000/4 kaj 2001/1).
- Arigi, sistemigi kaj disponigi bazajn dokumentojn de la ligo – papere kaj elektronike.
- Kunordigi la precizigon de taskoj de estraranoj kaj komisiitoj, helpi enkonduki novajn oficantojn, helpi aranĝi la logistikajn aspektojn de estraraj kunsidoj.
- Trakti informpetojn al la ligo, varbi membrojn kaj sekciojn, sub gvido de la sekretario.
- Provlegi tekstojn por IPR, helpi al la redaktoro kaj la redakcia komitato.
- Prizorgi la libro-stokadon kaj distribuon, realigi detalojn de la eldona agado.
- Evoluigi hejmpaĝojn de la Ligo, inkl. de la kvazaŭa lernejo.
- Evoluigi la konferencajn stud-semajnojn (posteaŭlono de la gimnazio).
- Kaj multe pli.

### 5. Eduko: investo por ĉiu

Konvinki la movadon, ke edukado esencas, kaj ke ne estas la

tasko de la instruistoj financi tion, estas komencita sed nefinita strebo. Sed necesas paralele lukti ankaŭ inter ni. Ni devas montri ILEI ne nur formale sed praktike kapabla starigi projektojn kaj realigi ilin. Alie, UEA kaj ĉiu prave diros: jes ni investos en edukado, sed ni faros tion pli efike tra Mazi aŭ Pasporta vidbendo, Indiĝenaj dialogoj, projekto Najbaroj, eldonado de vortaroj por albanoj, taĝikoj, kio ajn. Por peti kaj ricevi monon de UEA aŭ fondaĵoj, ni devas anticipi prezenti projekton, buĝeton, celojn, kune kun atendeblaj kaj mezureblaj rezultoj (kiel ni ja ekfaris). Sed, fine de la projekta periodo, ni devas povi reiri al tiuj deklaritaj rezultoj kaj montri ilin liveritaj (aŭ doni validajn kialojn kial ni modifis ilin). Tion ni nun apenaŭ povas fari, ĝuste pro nia labor(mal)forta pozicio. Tiukaze, eĉ ne decas aŭ indas starigi novajn petojn.

### 6. Interna komunikado kaj profesieco

Ret-mesaĝado unuflanke malfermis mirindajn eblojn, aliflanke ĝiaj negativaj efikoj jam strangolas la avantaĝojn. Agemuloj devas gluiĝadi ĉe komputilo anstataŭ krei utilaĵojn. Ni bremusu la svarmon da ret-mesaĝoj;

estraraj, diskut-grupaj kaj interasociaj. La dividoj de la taskoj estu pli klare difinitaj, pli rigore aplikataj, tiel ke simplaj problemoj ne bezonu ret-ping-pongadon kun mesaĝoj kreskantaj je ĉiu pingo. Nur tujaj respondeculoj mesaĝadu pri rutinaj demandoj. Ĉiu estu informita/konsultita nur kiam vere necesas.

La reprezentantoj ĉe la estraro de UEA (ILEI kaj TEJO) pledu por kreo de du diskut-retoj; unu interna por nur la estraranoj de UEA, kaj filtrita por pli larĝa rondo, al kiu apartenu la reprezentantoj de TEJO kaj ILEI. Por serioze kunlabori kun UEA, necesas partopreni en iu ĝia retejo, sed sekvi la nunan retumadon de kaj ILEI kaj UEA estas tasko farebla nur por emerito aŭ plentempa dungito.

Ni (kaj eĉ pli UEA) majstru la arton jungi la kapablojn de la profesiuloj (instruistoj, verkantoj, organizantoj, komputistoj, kio ajn) sen dronigi ilin en obstakloj, sen postuli malrealismajn devojn. Unu el la legende abundaj ret-komentoj de Renato Corsetti tekstas jene: “esperantistoj falas en du kategoriojn: aŭ ili faras nenion aŭ ili klopodas fari ĉion”. Pravege. Tio ne estas ilia persona kulpo, sed estas struktura afero. Tio devus esti kerna demando en la movado.

UEA starigis por sia elformata strategia plano la vertikalon “Profesieco” sed riskas tute maltrafi la kernan demandon sur la tereno. Ne nur ke la oficistoj de UEA aŭ aliaj komisiitoj agu pli profesie, sed ke tiuj malmultaj “verdaj profesiuloj” glatigu kaj ne malglatigu la vojon al kunlaboro de eksteraj profesiuloj. Estu difineblaj konkretaj utilaj taskoj laŭ la specialaj lertoj de tiuj profesiuloj, la tempo dediĉenda estu limigebla, la vojoj akiri praktikajn subtenojn (materialoj, kompenso, informoj) estu difinitaj kaj funkcii sen luktado, la maniero liveri la task-rezulton estu konsentita de la komenco. Tiel UEA kaj ILEI povus ĉerpi novajn utilajn fortojn. La nuna vojo ĉe ILEI “fariĝi estrarano” signifas alpreni nelimigeblan respondecon kaj okupiĝadon pri demandoj sur ajna tereno. Se ILEI ekhavis sian “verdajn profesiulon”, tio ne nur reportus la sorton de ILEI-estrarano en toleblajn limojn, ĝi malfermus la vojon jungi la kapablojn de nia membraro, kaj de tiuj homoj, kiuj devus ekesti niaj membroj, kiuj ambaŭ (laŭdifine) estas grandparte profesiuloj, kaj krome en kampo ŝlosile grava por ni ĉiuj.

*Stefan MacGill,  
vic-prezidanto de ILEI*



## Li Weilun

### Instrua metodo de Esperanto en superaj lernejoj

#### 1. Diferenco inter ĉinoj kaj eŭropanoj en lernado de Esperanto

Esperanto estas tre proksima al la eŭropaj lingvoj kaj diferenca de la ĉina lingvo. Tial estas pli facile por eŭropanoj lerni Esperanton. Ili povas kompreni multajn vortojn sen traduki kaj gramatikajn regulojn sen ekspliki. Oni povas uzi rektan metodon por instrui ilin. Kontraŭe, Esperanto kaj la ĉina lingvo estas diferencaj. Sen traduki ĉinoj ne povas kompreni Esperantajn vortojn. Ankaŭ gramatiko devas esti klarigata. Tial oni devas pli multe uzi gramatikan-tradukan metodon por instrui ĉinojn.

#### 2. Diferenco inter E-instruado en superaj lernejoj kaj tiu en aliaj lokoj

Altlernejaj studentoj estas junaj kaj havas pli altan kulturen nivelon. Ili scias almenaŭ unu fremdan lingvon. Por ili estas pli facile lerni Esperanton ol por personoj en socio. Oni povas parte uzi rektan metodon kaj komparan metodon (komparado kun aliaj fremdaj lingvoj). En

eksplikado de gramatiko oni bezonas nur akcenti trajtojn de Esperanto kaj povas forlasi la regulojn samajn kiuj identas en aliaj fremdaj lingvoj.

#### 3. Diferenco inter instruado de E-o kaj tiu de aliaj fremdaj lingvoj

La fonetiko kaj gramatiko de Esperanto estas multe pli facilaj kaj regulaj ol tiuj de aliaj fremdaj lingvoj. Tial en instruado de Esperanto oni povas kiel eble plej frue instrui fonetikon kaj gramatikon. Poste pere de ofta legado la lernantoj povas plimultiigi vortojn kaj en trejnado de buŝa lingvo povas plialtigi sian aŭdoparolan kapablon.

En lernado de Esperanto oni ne nur lernas lingvon, sed ankaŭ devas lerni Esperantan spiriton, koni la E-movadon kaj fine fariĝi esperantistoj kaj batali por realigi la idealon de Zamenhof. Tial en instruado de Esperanto oni devas prezenti la historion de la E-movado kaj propagandi Esperantan spiriton. Tio estas malsama al instruado de aliaj fremdaj lingvoj.

Lingvo kaj kulturo havas kompaktan rilaton. Por ellerni la lingvon de iu lando oni devas koni ĝian kulturon. Esperanto apartenas ne al iu lando, sed al la tuta mondo. Tial por lerni Esperanton oni devas koni la mondan kulturon.

Resume, mi opinias, ke en instruado de Esperanto en superaj lernejoj oni devas sekvi jenajn punktojn:

a) apliki sintezan metodon, t. e. asimili avantaĝojn de la gramatika-traduka metodo, rekta

metodo, aŭdoparola metodo, kompara metodo kaj aliaj metodoj. Ekzemple, laŭeble instrui Esperanton per Esperanto, sed ne ekskluzivi la ĉinan lingvon; instrui necesajn gramatikajn regulojn en lingva praktikado; emfazi aŭdadon kaj paroladon, kaj samtempe serioze atenti legadon, skribadon kaj tradukadon.

b) Laŭeble prezenti al lernantoj la mondan kulturon kaj la E-movadon, kaj esperantistigi ilin.

## Blazio Vaha

### Fabelkomencoj klasikaj

„*Vivis iam aŭ neniam – diras la fabelo – brava, paca kaj sagaca reĝo en kastelo.*

*Sur si kronon, sub si tronon li ja reĝe havis, ĝis limlando de la lando lia leĝo gravis*”

(Julio Bahy: Sagaca knabino)

„*Sur la granda vojo marŝis soldato*”

(Andersen – Zamenhof: Fajrilo)

### Enkonduko kun rememorigo

Antaŭ pli-malpli unu jaro mi citis en IPedRo<sup>1</sup> aron da Esperantaj fabelkomencoj el tradukaĵoj kaj originalaj fabeloj de kelkaj niaj literaturaj sukcesuloj, ĉefe de KABE kaj – la fratoj Grimm. Frapis min tiam la simpleco de la fabelkomencoj ĉe Kabe: „*Vidvino havis du filinojn.. Homo havis azenon...* Eva

<sup>1</sup> Internacia Pedagogia Revuo. IPedRo prezentas tipon de mallongigo, kian mi kum aliaj preferus al la kutimaj mallongigoj de tipo o--o(o-o), kaj kum malcerta akcento-loko.



ANDERSEN

# FABELOJ

Plena Kolekto

D<sup>m</sup> L. L. ZAMENHOF

UNUA PARTO

Farkas-Tatár tradukas komencofrazon de Béla Balázs jene: *Iam antaŭlonge vivis reĝo kaj reĝino.* [vd. la grafikajon sur p. 9.] Mi re-trarigardis tiam kolekton da fabeloj ankaŭ de Julio Baghy (pr. bagi), hungar-fabelan volumon tradukitan de Maria Benczik (pr. bencik) elde Elek Benedek, ukrainajn fabelojn esperantigitajn de N. H. Adrianova. *Ĉu estis, ĉu ne estis, eble trans la Fabelmaro estis tre-tre alta monto...* mi reskribis la hungar-fabele inspiritan komencokliŝon de Francisko Szilágyi. Mi citis ankaŭ el "esperantujaj prapatraj legendoj" de Doko. La titoloj ĉe li estas tre longaj, kaj kun nepra mencio pri io Esperanta: *Antaŭ multaj jarcentoj, kiam la mondo estis juna, kaj kiam estis drakoj en Eŭropo, kaj kiam estis gigantoj en Azio, nian Esperantujon vizitis du el la orienta lando Kvazaŭhinio.*

Tomasz Chmielik kaj Gerd Bussing, tradukante rakontojn


de Peter Bichsel... mezlonge informas pri kelko grava jam en la unuaj frazoj, ekzemple jene: *Viro, kiu havis nenion por fari, ne plu estis edzo, havis nek infanojn, nek laboron, pasigis sian tempon, reŝerpensante, kion li sciis...*

Mia celo, kiel oni povas vidi, estis ebligi aŭ almenaŭ kontribui al eblo, ke oni, multajn el ili ekzameninte, elektu kaj reuzadu la plej bonajn kliŝojn, malpliverŝajniĝi, malhelpeti, ke ĉiu tradukanto ĉiufoje rekomencu la tutan laboron de tradicio-kreado.

Kun infaneca, snobeta ĝojo mi citis, kiel menciite, antaŭ ĉio la klasike simplajn kabeaĵojn similajn al la sekvaj: *Estis antaŭ jaroj reĝo* (Ora birdo); *Estis iam maljuna kaprino* (Lupo kaj sep kapridoj); *Estis iam fiŝkaptisto kaj lia edzino* (Fiŝkaptisto kaj lia edzino); *Estis iam tajloro, kiu havis tri filojn* (Tablo kovru vin, orazeno kaj bastono el sako); *Estis iam homo maljuna kiel la mondo* (Maljuna avo kaj nepo); *Estis iam granda milito, kaj post la milito multe da soldatoj estis eksigitaj* (Kamarado Gaja); *Estis iam du fratoj, unu riĉa, alia malriĉa* (Du fratoj); *Estis iam maljuna reĝo* (Fidela Johano); *Estis iam malriĉa virino, kiu naskis filon* (Tri oraj haroj de l' diablo); - *Estis iam homo, lerta en multaj metioj* (Sesope oni

trairas la tutan mondon); *Estis iam malriĉa kamparano, nomata Kankro* (Doktoro Ĉioscia); *Estis iam juna homo kiu sin dungis kiel soldato* (Ursa felo). Mi estis ĉerpinta ĉi tiujn frazojn kun titoloj el *Elektitaj fabeloj* de Jacob kaj Wilhelm Grimm 1906, laŭ la teksto reaperinta en la jaro 1985a je eldono de Artur E. Iltis, Saarbrücken 1985. - Se la daŭrigo vin interesas, legu aŭ relegu mian laboreton *Fabelkomencoj* en *Internacia Pedagogia Revuo*, 29a jarkolekto, 1999/4, pp. 18-24.

Ĉi-sube mi aldonos similan kolektajn el la unuaj du volumoj de la Zamenhofaj tradukoj de la Andersenaj fabeloj. Andersenaj fabeloj aperis en Esperanto jam en la jaro 1909, tradukitaj de Skeel-Giorling. La Zamenhofaj tradukoj aperadis divers-tempe, kun konsiderindaj temp-intervaloj. La kvar volumoj dismetiĝas je 1923, 1296, 1932, 1963. (Tazio Carlevaro, 1974: 202). Legu ilin kun respekto al la verkinto kaj tradukinto kaj kun pardonemo al mi, certe ion mistajpinta. Ankaŭ ĉi-foje, refoje - unue, ĉiufoje, mi prezentos la komencofrazon, tuj poste, parenteze, la titolon de la fabelo, laŭ la skemo: *komenca propozicio/frazo de fabelo* (La titolo de la fabelo).



**La Zamenhofa maniero komenci fabelon: citaĵoj el du volumoj.** - Evidente pro Andersena influo, Zamenhof iam esprimadas sin malpli simple, ol la fama stilisto Kabe, tamen eble pli simple, ol liaj niatempaj posteuloj.

Jen do la komenco, la komenco de la unua fabelo: *Sur la granda vojo marŝis soldato: "Unu, du! unu, du!"* (Fajrilo).

Kaj jen daŭrigo longeta, komencoj de postsekvaj fabeloj: *En unu vilaĝo loĝis du viroj, kiuj ambaŭ havis la saman nomon* (Malgranda Niko kaj granda Niko). *Estis iam reĝido, kiu volis edziĝi kun reĝidino, sed li*



nepre volis, ke tio estu vera reĝidino. (Reĝidino sur pizo). "Miaj kompatindaj floroj tute forvelkis" diris la malgranda Ida. (Floroj de la malgranda Ida). Estis iam virino, kiu tre deziris havi malgrandan infanon, sed ŝi tute ne sciis, kie ŝi povus ĝin ricevi. (Elinjo - Fingreto). Estis iam maljuna poeto, efektive bona maljuna poeto (Malbon-konduta knabo). La malfeliĉa Johano estis tre malĝoja, ĉar lia patro estis tre malsana kaj baldaŭ mortonta. (Vojkamarado). Malproksime en la maro la akvo estas tiel blua, kiel la folioj de la plej bela cejano, kaj klara, kiel la plej pura vitro, sed ĝi estas tre profunda, pli profunda, ol povas atingi ia ankro; multaj turoj devus esti starigitaj unu sur la alia, por atingi de la fundo ĝis super la akvo. Tie loĝas la popolo de maro (La virineto de maro). Antaŭ multaj jaroj vivis unu reĝo, kiu tiel amis belajn novajn vestojn, ke li elspezadis sian tutan monon, por nur esti ĉiam bele ornamita (La novaj vestoj de la reĝo). En unu el la domoj de la Orienta strato en Kopenhago, proksime de la Nova Reĝa Bazaro, estis iam granda gastokunveno, kiel ofte okazas kaŭze de reciproka intervivado. (Galoŝoj de feliĉo).

Atentu! En la kamparo, tute ĉe la vojo, staris kampa domo; vi certe jam mem ĝin iam vidis. (Lekanto). Estis iam dudek kvin stanaj soldatoj, kiuj ĉiuj estis fratoj, ĉar oni fandis ilin el la sama malnova stana kulero. (Persista stana soldato). Tre malproksime de ĉi tie, tie, kien flugas la hirundoj, antaŭ ol venas nia vintro, loĝis reĝo, kiu havus dek unu filojn kaj unu filinon, Elizon. (Sovaĝaj cignoj). Estis iam reĝido: neniu havis tion multajn kaj tiel belajn librojn, kiel li. (Ĝardeno de la paradizo). Vivis iam komercisto, kiu estis tiel riĉa, ke tutan straton kaj eĉ ankoraŭ flankan strateton li povus plenpavimi sole per grandaj arĝentaj moneroj. (Fluganta kosro). Sur la lasta domo de malgranda vilaĝo troviĝis nesto de cikonioj. (Cikonioj). En la urbo Florenco, ne malproksime de la Piazza de Granduca, troviĝas malgranda transversa strato, kiu, se ni ne eraras, estas nomata "Porta Rossa". (Kupra porko). En la lasta tempo ni faris malgrandan vojaĝon, nun ni deziras entrepreni pli grandan, Kien? Al Sparto! Al Mikenon! Al Delfoj! (Ligo de amikeco).

En la dua volumo de la Andersenaj fabeloj troviĝas jenaj fabelkomencoj: Ĉiuj kantoj

de la oriento parolas pri la amo de la najtingalo al la rozo: en la silentaj stellumaj noktoj la flugilhava kantisto faras serenadon al sia bonodora floro (Rozo de la tombo de Homero). En la tuta mondo neniu scias tion multe da historioj, kiel la dio de dormo. Li estas bonega rakontisto. (Dio de dormo. Subtitoloj: Lundo, Mardo, Merkredo, Ĵaŭdo, Vendredo, Sabato, Dimanĉo). Estis iam reĝido, kiu havis nur tre malgrandan regnon: ĝi tamen estis sufiĉe granda, por ke oni povu edziĝi en ĝi, kaj edziĝi li volis (Paŝtisto de porkoj). Se post fulmotondro oni preteriras poligonan kampon, oni ofte rimarkas, ke ĝi aspektas nigre kaj kvazaŭ bruligite. (Poligono). - Ĉiun fojon, kiam mortas bona infano, anĝelo de Dio malleviĝas sur la teron, prenas la mortintan infanon sur siajn brakojn, etendas siajn grandajn blankajn flugilojn, flugas super ĉiujn lokojn, kiujn la infano amis, kaj ŝirkolektas plenmanon da floroj, kiujn li alportas supren al Dio, por ke ili tie floru ankoraŭ pli bele ol sur la tero. (Anĝelo). En Ĥinujo, kiel vi sendube scias, la imperiestro estas Ĥino kaj ĉiuj liaj ĉirkaŭantoj estas ankaŭ Ĥinoj. (La najtingalo). Turbo kaj pilko kuŝis inter aliaj ludiloj kune en

unu tirkesto, kaj la turbo diris al la pilko: "Ĉu ni ne fariĝu gefianĉoj, ĉar ni kuŝas ja unu apud la alia en unu tirkesto?" (Gefianĉoj). En la arbaro estis belege! Estis somero. (Malbela anasido). En la arbaro staris beleta abio; ĝi havis bonan lokon, kaj suno povis penetri al ĝi, estis sufiĉe da aero, kaj ĉirkaŭe kreskis multe da pli grandaj kamaradoj, abioj kaj pinoj. (Abio). Nun ni komencas. Kiam ni venos al la fino de la historio, ni scios pli multe ol ĉe la komenco. (Neĝa reĝino. Fabelo en sep rakontoj. Unua rakonto: Kiu parolas pri la spegulo kaj la rompopecetoj). En la granda urbo, kie ekzistas tion multe da domoj kaj da homoj, ke ne ĉiuj homoj havas sufiĉe da loko por ĝardeneto kaj kie la plimulto tial devas kontentiĝi je floroj en florpotoj, estis tamen du malriĉaj infanoj, kiuj havis ĝardenon iom pli grandan ol florpoto. (Dua rakonto: Malgranda knabo kaj malgranda knabino). Sed kio fariĝis kun la malgranda Gerda, kiam Kay plu ne revenis? Kie en la mondo li troviĝis? Neniu tion sciis, neniu povis doni informon pri tio. (Tria rakonto: La florgardeno de la virino, kiu povosciis sorĉi). Gerda devis denove ripozi (Princo kaj reĝidino). Ili veturis tra la malluma arbaro,



sed la kaleŝo lumis malproksimen. (Kvina rakonto: Malgranda rabistinfrano). Antaŭ malgranda, malgravaspekta dometo ili haltis. (Sesa rakonto: Lapino kaj Finnino). La muroj de la palaco estis stararanĝitaj de la turniĝanta neĝo, kaj tranĉantaj ventoj aranĝis la pordojn kaj fenestrojn, (Sepa rakonto: Kio estis en la palaco de la neĝa reĝino kaj kio okazis poste). Estis iam malgranda knabo, kiu malvarmumis. Li estis elirinta kaj malsekigis al si la piedojn; neniu povis kompreni, kiamaniere tio fariĝis, ĉar estis tute seka vetero. (Sambuka virineto). Estis iam flikilo, kiu etis tiel delikata kaj pinta, ke ĝi imagis al si, ke ĝi estas kudrilo (Flikilo). En la malvastaj stratoj de la granda urbo, kiam la suno subiris kaj la nuboj supre inter la kamentuboj lumis orkolore, jen tiu jen alia aŭdis ian strangan tonon, similan al sono de preĝeja sonorilo, sed pro la bruo de la veturiloj kaj de la movado oni povis distingi ĝin nur dum mallonga momento. "Nun sonas la vespera sonorilo!" oni diradis, "nun la suno subiras!" (Sonorilo). Avineto estas tre maljuna, ŝi havas tre multe da sulkoj sur la vizaĝo kaj tute blankajn harojn, sed ŝiaj okuloj lumas ankoraŭ kiel du steloj, ili estas eĉ multe pli belaj,

ili estas tiel mildaj, kaj estas plezuro rigardi en ilin. (Avineto). Rapide kaj lerte kuradis kelke da lacertoj en la fendoj de maljuna arbo; ili bone povis kompreni unu la alian, ĉar ili parolis lingvon de lacertoj (Monteto de elfoj). Estis iam malgranda knabino, tre delikata kaj beleta, sed en somero ŝi devis ĉiam iri nudpiede, ĉar ŝi estis malriĉa, kaj en vintro kun grandaj lignaj ŝuoj, tiel ke la piedartiko de ŝia malgranda piedeto fariĝadis tute ruĝa, kio aspektis tre mizere. (Ruĝaj ŝuoj). Ĉu vi iam vidis vere malnovmodan ŝrankon, tute nigran pro maljuneco kaj kun skulptitaj spiralaĵoj kaj foliaĵoj? Ĝuste tia estis en unu loĝejo (Paŝtisto kaj kamentubisto). En Danujo staras malnova kastelo, nomata Kronborg, kiu troviĝas tute ĉe la Sundm kie la grandaj ŝipoj ĉiutage grandanombre preterveturas, Anglaj, Rusaj, Prusaj. (Dano Holger). Ĉu vi aŭdis jam la historion pri la malnova strata lanterno? Ĝi certe ne estas tre gaja kaj amuza, tamen unu fojon oni povas ĝin aŭskulti. (Malnova strata lanterno). Vere, oni povus supozi, ke en la vilaĝa lageto okazis ia grava fariĝo, sed en efektiveco nenio okazis (Najbaraj familioj). Jes, tio estis la

malgranda Tuk. En efektiveco lia nomo ne estis Tuk, sed kiam li ne povis ankoraŭ bone paroli, li mem sin nomis Tuk; tio devis signifi Karolo, estas bone, se oni tion scias. (Malgranda Tuk). En unu flanka strateto staris malnova, tre malnova domo; ĝi havis la aĝon de preskaŭ tricent jaroj. (Malnova domo). Vi certe ja konas grandigan vitron, rondan vitron, kiu ĉion faras centoble pli granda ol ĝi estas

en efektiveco? (Guto da akvo). Ĉi tie en nia lando la plej granda verda folio certe estas la folio de lapo (Feliĉa familio).

Jen do la fino de la citaĵoj el la dua volumo. La trian kaj la kvaran volumojn mi ne ĉehavas, nek havas entute, do mi ĉesas citadi, provizore. Morgaŭ aŭ postmorgaŭ ni citadu kune. – En ĉi frazo lasta estas vorto lasta.

### Literaturo:

- Andrianova N. H.. 1983: *Ukrainaj popolaj fabeloj*. Kiev.
- Andersen, (H. C.) (1923)/1926: *Fabeloj*. Plena Kolekto. Unua Parto. Tradukis D<sup>o</sup> L.L. Zamenhof. Dua eldono, Paris. Esperantista Centra Librejo, 51, Rue de Clischy (9<sup>e</sup>).
- Andersen, (H. C.) 1926: *Fabeloj*. Plena Kolekto. Dua Parto. Tradukis D<sup>o</sup> L.L. Zamenhof. Unua eldono, Paris. Esperantista Centra Librejo, 51, Rue de Clischy (9<sup>e</sup>).
- Kabe 1906/1985: *Elektitaj fabeloj* de Jacob kaj Wilhelm Grimm, eldono de Artur E. Iltis, Saarbrücken.
- Baghy, Julio: 1966: *Ĉielarko*. Antologio de fabeloj, originale en verso reverkitaj.
- Balázs, Béla: 1970: *La sep reĝidoj*. Ilustris: Ádám Würtz. Tradukis: Éva Farkas-Tatár. Hungara Esperanto-Asocio.
- Benedek, Elek 1983: *Hungaraj fabeloj*. Elektis kaj tradukis: Mária Benczik. Budapest.
- Bichsel, Peter 1991: *Rakontoj por infanoj* (Kindergeschichten). Esperantigis: Gerd Bussing, Tomasz Chmielik, Svidniko.
- Carlevaro, Tazio 1974: *Traduka beletro*. En: Lapenna, Ivo (ĉefred.) – Lins, Ulrich (red.): Carlevaro Tazio 1974: *Esperanto en Perspektivo*. Faktoj kaj analizoj pro la internacia lingvo, 190–248.
- Doko 1990: *Rakontoj de niaj prapatroj*. Falsloraj ekzercoj pri nia lando antaŭ multaj jarcentoj kiam okazadis mirindaj aferoj. Redaktis kaj korektis Tomasz Chmielik. Komputere kompostis: Pawel Wimmer, Svidniko.
- Grimm, Jacob – Grimm, Wilhelm 1906/1985: *Elektitaj fabeloj* de Jacob kaj Wilhelm Grimm, trad. Kazimierz Bein (D<sup>o</sup> Kabe), eldono de Artur E. Iltis, Saarbrück.
- Lapenna, Ivo (ĉefred.) – Lins, Ulrich (red.) Carlevaro Tazio 1974: *Esperanto en Perspektivo*. Faktoj kaj analizoj pro la internacia lingvo. Universala Esperanto-Asocio. London – Rotterdam.
- Vaha, Blazio: *Fabelkomenco*. Internacia Pedagogia Revuo, 4/1999, 18–24.



## **Aŭstralio**

### **Raporto pri instruado de Esperanto**

#### **Sud-Aŭstralio:**

En *Adelajdo*, estas 5 instruistoj, kiuj instruas malgrandajn grupojn de plenkreskuloj.

Unu el tiuj instruistoj, *John Gallagher* ankaŭ instruas unu studenton per retpoŝta kurso. Krome, li komunikas kun la esperanto-klaso de japana instruisto kiu trovis la nomon de *John* per Kvazaŭlernejo.

#### **Kvinslando (Queensland):**

Estas du aktivaj grupoj en ĉi tiu provinco. Unue, en *Brisbane*, 6 maturuloj partoprenas klasojn kadre de la organizo U3A (Universtitato de la Tria Aĝo); *Kay Andersen* gvidas la klasojn. Okcidente de *Brisbane*, en la urbego *Toowoomba*, *Dianne Lukes* instruas infanojn en du lokaj elementaj publikaj lernejoj.

#### **Okcidenta Aŭstralio:**

Dum 2000, du instruistoj instruis esperanton en lernejoj en *Perto*. *S-ino Penny Vos* instruis ĉirkaŭ 60 infanojn (6 ĝis 15 jaraĝaj) en *Treetops Montessori* lernejo. La lernantoj ĝuis retkontakton kun samaĝaj studentoj en Svislando. La klasoj daŭros ĉi jare (2001). La muzikinstruisto de la lernejo ankaŭ interesiĝis pri Esperanto kaj komencis lerni ĝin kun la helpo de *Penny*. Ŝi tradukis kantojn Esperanten kaj ili kantis ĉe Perta familia noktoklubo.

*S-ino Trish O'Connor* instruis ĉe la *Perth Montessori* lernejo. La klasoj estis en 3 grupoj laŭ aĝo; 3 - 6 jaraĝaj, 6 - 9 jaraĝaj kaj 9 - 12 jaraĝaj, entute ĉirkaŭ 80 infanoj. *Trish* ankaŭ instruis Esperanton dum 8 semajnoj al grupo de studentoj kadre de PEAC (apartaj klasoj por pli inteligentaj infanoj). La studentoj venis el 16 lernejoj.

#### **Viktorio:**

Esperanto estas instruata en tri grupoj, sub la gvidado de *Marcel Leerveld*, *Jennifer Bishop* kaj *Margaret Warr*. *Ken Rolls* kaj *Franciska Toubale* instruas grupon de ok studentoj ĉe la Asocio por Edukado de

Plenkreskuloj; plejparte, tiuj komencis lerni la lingvon kadre de la Somerlernejo ĉe *Melburno*.

#### **Ekzamenoj de la Aŭstralio Esperanto-Asocio:**

Dum la jaro 2000, 16 esperantistoj sukcesis en 5 niveloj. Baza - 6; Elementa - 3; Meza - 3; Supera - 2; Alta - 2.

#### **Korespond-kursoj:**

*Hazel Green* administras la korespond-kursojn por Aŭstralio; dum la jaro 2000, 14 homoj aĉetis 21 korespondajn kursojn.

*Kay Andersen*  
Kunordigantino por Aŭstralio  
kjand@ozemail.com.au

## **Belgio**

Kadre de la ILEI-projekto INTERKULTURO, 5-a klaso de elementa lernejo en *Binche*, Belgio, ĵus ekis E-kurson; fakte la instruistino (*S-ino Lecron*) eklernas la lingvon samtempe kun siaj gelernantoj. Tio postulas multe da kuraĝo, des pli, ke loka troviĝas neniu sperta e-isto. Por kuraĝigi ilin, kaj samtempe silentigi negativajn antaŭjuĝojn de gekolegoj, vi povas sendi etan simpatian mesaĝon, ĉu rete: [cnbds.binche@sec.cfwb.be](mailto:cnbds.binche@sec.cfwb.be), kun la mencio "pour la 5e primaire B, Mme Lecron: por la 5-a elementa klaso B, S-ino Lecron", ĉu poŝte (bildkarto sufiĉas) al jena adreso:

*Ecole du Sacré-Coeur, classe de 5e B (Mme Lecron), avenue de Burlet, BE-7310 Binche, Belgio*

*Germain Pirlot*

## **Britio**

### **Jarraporto de Esperanto Teachers' Association**

Dum pluraj jaroj *ETA* spertis krizajn problemojn. En marto 2000 la tiama komitato deziris ekŝiĝi, kaj pro manko de subtenantoj, proponis malfondi la asocion kaj fordoni ĝian bonharon al simila organizo. Por permesi al *ETA* daŭri, kvarkapa komitato sin prezentis, estis elektita de la membraro, kaj promesis plenumi limigitan programon por la sekva jaro.

La nova komitato estis:

- Roy Simmons, prezidanto
- Malcolm Jones, vic-prezidanto
- Angela Tellier, sekretario
- Ian Mac Dowall, kasisto



Jen resumo de la jara agado:

- Jam februare okazis la dua dunivela semajnfina kurso en Felixstowe: ĉi-foje kun la temo 'Saksoj' kaj kun la tre bonvena, lerta instruado en la progresanta grupo de Ivo Durwael el Belgio.
- La aliĝkotizo al ETA laŭ la jarkunvena decido malpliigis ĝis £5.00.
- La nova bulteno, *iEL (instruado Esperanta- lerte!)*, aperis kvarfoje dum la jaro, kvankam materialo mankis por la lasta eldono pro la fakto ke ĝi estis tro proksima al la prokrastita januara eldono. La bulteno estis sendita al 70 anoj (el kiuj ĉ. 25 estas individuaj membroj de ILEI).
- Artikolo kaj anonco pri Urso-Kurso aperis en la porlerneja gazeto "Questions and Answers" en septembro, kaj kopio de la artikolo estis eldonita en nia bulteno.
- La sezona bulteneto "Bear Facts" komencis sian trian jaron kaj estas sendata al tiuj infanoj, kiuj daŭre sekvas la Urso-Kurso-n; infanoj, kiuj partoprenas la konkursojn, ricevas kuraĝigan premieton.
- Bedaŭrinde, nepriisprokrasti aranĝitan someran semajnfinan porinfanan kurson ĝis oktobro. Sep familioj interesiĝis pri la somera kurso sed mankis aliĝoj por la oktobra, kiu estis nuligita.
- ETA ne estis reprezentita ĉe la ILEI konferenco precipe pro la frua dato.
- Aŭtune mortis multjara membro de la asocio, Fraser Dunbar, kies forpaso signifas grandan perdon. Li multege kontribuis al la instrua agado de ETA, precipe per la kursoj ĉe Belstead House, Ipswich, kaj poste en Felixstowe. Aparte lastatempe, kaj malgraŭ kreskanta malsano, li ankaŭ gravege kontribuis al la administra laboro de EAB.
- Hilary Chapman daŭrigis la iom pli junan tradicion de ETA, kaj aranĝis sukcesan porinstruistan kurson kiel parton de la "Ni Festivalu!" semajnfino en Barlastono ĉi-januare.
- La intenco ŝanĝi la nomon de la asocio kaj la kvorumon de difinita nombro al procentaĵo de la membraro ne eblis dum la jarkunveno 2000 pro manko de averto. Tamen la komitato avertis la membraron, ke estos propono por la jarkunveno en 2001. La sama komitato sin prezentas por la sekva jaro.

*Malcolm Jones,  
vic-prezidanto de ETA*

## Finnlando

La nova estraro de la finna ILEI-sekcio

Sekciestro: Carola Antskog  
Dragsfjärdvägen 690, FI-25700 KIMITO  
Telefona: 358 02/ 423 133. Retadreso: [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi)

Sekretario: Sylvia Hämäläinen  
Teivaalantie 85, FI-33400 TAMPERE  
Telefona: 358 03/ 346 3493. Retadreso: [veli.hamalainen@kolumbus.fi](mailto:veli.hamalainen@kolumbus.fi)

Kasisto: Tapio Sormunen  
Kirjurinkuja 1 H1109, FI-02600 ESPOO  
Tel 358 09/ 5416 602. Retadreso: [tapio.sormunen@siemens.fi](mailto:tapio.sormunen@siemens.fi)

Komitatoj por la jaroj 2001-2003: Carola Antskog kaj Sylvia Hämäläinen

*Informis: Sylvia Hämäläinen*

## Francio

Manifestacio por lingvo-diverseco en Parizo

Francaj instruistoj ne malofte protestas kontraŭ la decidoj de la Ministerio pri Edukado. Tamen unuafoje, kune kun la plej diversaj sindikatoj, res-





ponde al Alvoko de Asocioj de Instruistoj de Fremdaj Lingvoj (itala, hispana, portugala, rusa ktp.) la 14-an de marto 2001 tricento da instruistoj manifestaciis por vera lingvo-diverseco en la instruado de lingvoj. Anstataŭ kontraŭstari la influegon de la angla (kaj 2-grade de la hispana), la Ministerio malaperigas postenojn pri la aliaj lingvoj (eĉ pri la germana, ĉe la germana landlimo!). Sekve ĉiuj instruistoj estas mal-kontentaj: instruistoj pri la angla kaj hispana, ĉar ili frontas klasojn kun 35 lernantoj aŭ pli, la aliaj, ĉar eĉ post ĉasado de lernantoj ne sufiĉas la lernantoj kaj la posteno malaperas.

Apud la belaj frazoj pri la neceso paroli lingvojn, la Ministerio reduktas de 3 horoj al 2 horoj la instruadon de fremda lingvo; enkondukas ĝin en la infanĝardenon, sed pro manko de instruistoj dungos plej verŝajne denaskajn parolantojn (kvazaŭ por paroli france sufiĉus, ke ĉiuj francoj fariĝu instruistoj de la franca lingvo!).

Evidente esperantistoj ne povis resti for: kvankam ne invititaj al la preparlaboroj, ili aperis kun bela banderolo „Esperanto: la mondo ĉe la langopinto” (en la franca „langue” signifas kaj lingvon kaj langon) kaj distribuis informilon pri la rolo de esperanto por vera lingvo-diverseco. Tute neatendite ĝis tia grado, ili frontis malamon kaj intereson kaj havis okazon serioze diskuti kun la plej malfermitaj inter la kolegoj.

*Renée Triolle*

## Hungario

### Raporteto pri la hungara sekcio de ILEI 2000/2001

En 2000 ni havis 39 membrojn. Tio signifas ioman malkreskon kompare al 1999. La sola komuna aranĝo de la sekcio estis la tradicia pedagogia konferenco en februaro 2000, kun la ĉeforganizo de nia karmemora kolemino, s-ino Barcsay Zsuzsa.

La iama adresaro de s-ino Barcsay enhavas informojn pri pli ol tricent E-instruistoj. Nur ĉ. 12 procentoj de ili membriĝas en ILEI. Proksimume la duono de niaj membroj instruas E-on al iom pli ol 100 gelernantoj (ĉefe al studentoj, kiuj intencas trapasi lingvoekzamenon). Nia membro, s-ino Kovács Márta, en la nomo de nia sekcio kompilis kaj dissendis enketilon al ĉiuj adresoj de la fama adresaro de s-ino Barcsay. Post la analizo de la respondoj mi kompilos malgrandan statistikon ankaŭ por IPR.

Kun la ĉeforganizo de s-ino Kovács Márta, en februaro 2001 ni havis sukcesan pedagogian tagon en Budapeŝto kun la partopreno de pli ol 50

pedagogoj. Sekve de la enketilo kaj tiu de la sukcesa konferenco, en 2001 nia sekcio ekhavis plurajn novajn membrojn.

Kontribuintoj de la programo (i.a.): Farkas-Tatár Éva, Smidéliusz Katalin, Mészáros Béla, Bujdosó Iván, Barossné Kóródy Zsófia, Vizi László, Princz Oszkár, Szilvási László, Stefan MacGill, Kovács Márta.

S-ino Nagy Kornélia kun folkloro koruso prezentis E-lingvajn kantojn por omaĝi al la memoro de s-ino Barcsay. Krome, nia asembleo starigis fonduson, kiu kolektas monon por memortabuleto (aŭ io simila) por nia forpasinta kolemino.

*Németh József, sekciestro*

## Togolando

### Esperanto pli kaj pli entrudiĝas en lernejojn

S-ro ADOKPE Tokouda Raymond instruas la lingvon al ĉiuj lernantoj de la privata kolegio SAVOIR de Lome. Tiel, de la unua ĝis la kvara klaso, ĉiuj lernantoj partoprenas la kurson. En la horar-tabelo ĉiu klaso havas unu horon de Esperanto kurso semajne.

Apude, en CEG ANFAME, s-ro GBEGLO Koffi instruas E-on al kelkaj lernantoj. Tiuj prezentis la lingvon al la aliaj lernantoj kaj invititoj dum la kultura semajno de la 9-a ĝis la 13-a de aprilo 2001.

Salutvortojn gratulajn sendu al tiuj kolegioj, kiuj pretas ĝemeliĝi kun aliaj lernejoj:

– ADOKPE Tokouda Raymond, Instruisto de Esperanto. Collège "LE SAVOIR". B.P. 494 Lome-Togo. Tel: (228) 27 11 8

– CEG ANFAME IRED GOLFE, B.P. 80252, Lome-TOGO. Tel: (228) 08 34 06

## Usono

### Unika kolokvo

Dudeko da edukistoj el Usono kaj eksterlando kunvenis en la federacia ĉefurbo Vaŝingtono en la 5a de aprilo 2001, por partopreni en unika kaj unuafa kolokvo, organizita de fondaĵo pri Esperanto-studoj, Esperantic Studies Foundation (ESF). La temoj de tiu intensiva tago restis en fokuso tra la postaj tri tagoj, kiam la kolokvintoj formis signifan delegacion en la samloka kvara ĉiujara konferenco de la Nacia Komitato de Malpli Ofte Instruataj Lingvoj (angla akronimo: NCOLCTL).

Partoprenintoj venis el ĉiu angulo de Usono, krome el Kanado kaj tri el Eŭropo. Kontribuis aktive kaj egale veteranoj de la eduka sceno, kaj



freŝbakitaj universitataj studentoj, kiuj mem gvidas kurson en sia universitato. Ĉeestis du eks-prezidantoj de ILEI.

La tagordo entenis kvin rubrikojn:

1. Klasĉambra instruado: Niveletoj, amplekso, lerniloj, helpiloj, varbado, instruista trejnado kaj akreditado, akceptigo de kursoj en lernejaj programoj.
2. Semajnfinaj intensaj kursoj: Kaz-studo el Nederlando; aplikeblo al Usono; reklamado kaj celgrupoj.
3. Familioj, hejm-edukado: Kreo de konvenaj stud-materialoj. Fone: unu el ses familioj en Usono elektas eduki siajn infanojn eksterlerneje; tiucelaj gepatraj retoj subtenas tion.
4. Telelernado: Korespondaj kursoj, son- kaj vid-bendaj kursoj, TTT-kursoj, retbabilejoj, retrondoj, DVD-materialoj, interagaj teknologioj. Kiel reteni kaj aktivigi ret-kaptitojn?
5. Uzado de Esperanto: La rolo de kulturaj konoj kaj faka enhavo en kursoj; lernado pere de Esperanto. Prezento de la projekto "Interkulturo" de ILEI.



De maldekstre: Alvino Fantini, Grant Goodall, Stefan MacGill, Amanda Higley, Duncan Charters, Mark Fettes, Katalin Smidéliusz

Aktuala temo estis la stato kaj estonto de NASK, la tradiciaj someraj kursoj en San-Francisko. Ĉi-jare ili okazos je du niveloj tra du semajnoj en nova pli centra universitato; celate estas trovi por tiu aranĝo konstantan hejmon kie eblos restarigi la tri-semajnan, kvar-kursan modelon.

Oni pledis por pli da kursoj en kiu oni instruas iun enhavon pere de Esperanto, ne nur en la kvara nivelo – povus temi ekzemple pri interkulturaj interŝanĝoj (ja la kursanaro estas diverskultura) aŭ konflikto-solvaj teknikoj (pac-edukado).

Leviĝis interesaj ideoj pri la rolo de por-instruistaj kursoj, laŭ kiu la kursgvidantoj kaj trejnotoj partoprenus en unu-semajna prepar-kurso antaŭ la ĉefa aranĝo. Kursgvidantoj tiam preparus siajn kursojn, klarigante la enhavojn kaj celojn al la trejnatoj kaj delegante al ili la pretigon de specifaj elementoj en la kurso. Sekvus du-semajna kurso por ĉiu, en kiu la gvidantoj kaj la trejnatoj en kohera kunlaboro gvidos la laborojn. La instruista kurso daŭrus tra tiuj du semajnoj, eble kun pliaj partoprenantoj, dum kiu oni taksus la kontribuon kaj plenumon de la taskoj faritaj de la trejnatoj.

Lige kun tio, okazis multaj diskutoj pri la ekzamenoj de ILEI, i.a. de la nova instru-rajtiga parto. Ĉeestis la nuna kaj (re)fonda sekretarioj de la ekzamenoj kaj la prezidanto kaj vic-prezidanto de IEK. Kelkaj ŝanĝproponoj por la regularo de la lingvo-ekzamenoj survojas, diskutite estis ankaŭ kiel NASK povos liveri la provejon por lanĉo de la nova ekzamena branĉo pri instruista trejnado.

Pri reta instruado, ESF starigas hejmpaĝojn por edukaj materialoj. Estis pledo, ke aperu pri tio precizaj indikoj kiel instruistoj kaj aliaj verkantoj sen granda ret-sperto liveru edukajn materialojn por ke ili plej konvene povu aperi kaj esti je elektronika dispono.

Konsenton rikoltis sugesto pri kompilo de elektronika katalogo de lerniloj, aranĝita datumbaze, kun konsekvenca priskribado (kaj eventuale taksado). Tio povos liveri indikojn (kaj foje ret-saltojn) al aperintaj recenzoj pri la verko. Prezento en la posta konferenco montris similan konstruitan skemon (LangNet) por lerniloj en 19 lingvoj, en kiu aŭtoro verkas propran normigitan priskribon, kiun suplementas priskribo de fakula triopo.



Vespere per sursina komputilo eblis viziti diversajn hejmpaĝojn, i.a. la kvazaŭa lernejo de "Interkulturo". Tiu kultura dimensio reliefigis tre klare, ne nur inter la esperantistoj, sed ankaŭ inter la lingvo-instruistoj kaj iliaj prezentajoj en la konferenco.

Kolokvanoj dufoje kontribuis al la konferenco. Ĝuste interkulturo estas la ĉeffako de d-ro Alvino Fantini, kiu prelegis pri manieroj karakterizi kaj eĉ mezuri interkulturitecon. La konata projekto "Indiĝenaj dialogoj" estis dismontrita per okulfrapa afiŝ-prezento. Parto de la konferenco disvolviĝis en la instituto kie la usonaj diplomatoj intensive akiras siajn lingvajn kapablojn, kaj eblis viziti ties faciligojn.

Multaj valoraj ideoj kaj iniciatoj sondiĝis el ĉi tiu kolokvo kaj estos certe post-sekvataj tra venontaj monatoj kaj jaroj.

*Stefan MacGill, Hungario.*



*De maldekstre malantaŭe: Stefan MacGill, Duncan Charters, Grant Goodall, Sylvain Lelarge, Derek Roff, Bill Masey, Ellen Eddy, Lana Shlafer. Antaŭe: Katalin Smidéliusz, Mark Fettes, Amanda Higley*

## Ellernu! Szilágyi kaj Szilvási

*(Recenzo pri du lernolibroj)*

Antaŭ proksimume unu jaro mi akiris du librojn. La unua venis perpoŝte. Ĝi estis *Összefoglaló eszperantó nyelvtan* (Resuma Esperanta gramatiko) de László Szilvási. (Budapeŝto, 1999, LINGVO-Studio kaj Kulturális Eszperantó Szövetség). Unue mi pensis, ke ĝi estas kristnaska donaco (mi kelkfoje ricevas propagandilojn kaj informojn de ili, dankon), sed poste evidentiĝis al mi, ke mi devas esti feliĉa, ke mi ja ricevas rabaton, krome mi pagu aŭ mi resendu la libron ene de unu semajno. Resendi estas pli malfacile, do mi pagis.

La alia estas malnova libro, mi trovis kaj aĉetis ĝin en librobrokantejo, la prezo estis ĉirkaŭ la dekonono de la unua. Ĝi estas *Ellernu! Progresá kurso de esperanto* de Francisko Szilágyi, eldonis Literatura Mondo en 1937. Komuna estas la celo de la du libroj: oni ne nur komencu lerni Esperanton. Ankaŭ nun validas la enkonduko de Szilágyi, el kiu mi citas kelkajn detalojn:

"Ni havas lertajn reklamistojn, kies voĉo kelkfoje estas pli laŭta ol necese; kaj la rezulto estas, ke konsiderinde multaj viciĝas sub la sankta signo de l'espero. Sed kion ni vidas post la bonege gviditaj, amuzplenaj, mallongaj kursoj. ...

Oni kredigas al la amaso, ke tre baldaŭ, post semajnoj oni scios la lingvon kaj per tiu metodo ni kreas aron de elreviĝintoj, kiuj post kelka tempo estas multe pli malproksime de nia movado, ol tiuj, kiuj neniam konatiĝis kun ĝi. Ni scias, ke nia lingvo estas vere la plej facila el ĉiuj lingvoj, sed ĝenerale la komencanto post la antaŭa propagando atendas miraklon. ...

Ne estas sufiĉa la amaso, kiu komencas la lernadon, ne estas sufiĉe lerni la lingvon, sed ellerni, ellerni! La "bonan tagon" esperantistoj nenion valoras. Kabe pravis: La Esperantistoj ellernu Esperanton!"

La libro estas unulingva, do internacie uzebla, Szilágyi jam vivis en Svedio, kiam li aperigis ĝin, sed jam uzis la materialon por kursoj dum kelkaj jaroj. Ĝi konsistas el dek ok lecionoj, ĉiu leciono havas kvin partojn: I. Gramatika parto, II. Konversacia parto, III. Literatura parto, IV. Grup-ludo, V. Kontrolo.

El la libro oni lernas ankaŭ pri la Esperanta kulturo, temas pri aŭ estas citaĵo el la Fundamenta Krestomatio, Parnasa Gvidlibro, Verkoj de FeZ, La vojo, Trans la Fabeloceno, poemoj de Kalocsay kaj Raymond



Schwartz, novelo de Julio Baghy, Edmond Privat, kaj kompreneble pri kongresoj kaj aliaj movadaj programoj.

La libro de Szilvási estas verkita por hungaroj, kiel ankaŭ la subtitolo montras; la intenco estis helpi tiujn, kiuj volas meti mezgradan ŝtatan lingvoekzamenon pri Esperanto. En Hungario tiu ĉi ekzameno estas dulingva, parto de ĝi estas traduko el kaj al Esperanto. La libro de Szilvási ne estas uzebla en ĝi mem, en la enkonduko ankaŭ la aŭtoro proponas uzi ĝin kune kun iu lernolibro. La ĉefa temo estas la gramatiko, sed konsiderinda parto de la 170-paĝa libro temas pri la Esperanta movado, organizaĵoj kaj servoj. Ofte estas legebla en propagandiloj de Szilvási (kaj li tute pravas), ke ne sufiĉas lerni nur la lingvon, ĝia lernanto iĝos Esperantisto, se li/ŝi uzos ĝin en la praktiko. (Kompreneble en la libro troviĝas ankaŭ modelsentencoj pri Eventoj, novajservo RET-INFO.) Oni ofte aŭdas, ke pli sukcese ellernas fremdan lingvon tiu, kiu bone konas sian gepatran lingvon. En la hungarlingva parto de la libro troviĝas multaj detaloj, kiuj ne povas esti modeloj por la lernantoj de la lingvo. Parte, ĉar Szilvási volas kompari Esperantajn kaj hungarajn frazojn laŭvorte, do unue donas ekzemplon, kiu ne ekzistas en la Hungara, kaj poste la veran tradukon. (Ekz. *Ő van férfi, vagyis ő férfi.* (p. 23.), *Én birtokolok házat, vagyis nekem van házam* (p. 22.) ktp.) Kelkfoje ni trovas nur version, kiun oni neniam diras en la hungara: *Vidd ki a macskát a lakáson kívülre!* (p. 32.), *Bemegyek Miskolc belsejébe,* közepére. (p. 78.) *Maradj szabó a mesterségednél* (p. 30.), *Milyen* (szó szerint: melyik) *dátum van ma?* (p. 79.) Ekzistas multaj aliaj ekzemploj, sed ili povas esti interesaj nur por hungaroj, kiel ankaŭ tio, ke multfoje mankas aŭ troveblas superflue komo antaŭ *és, stb., vagy, ha, aki, mint, hogy* (kaj, ktp., aŭ, se, kiu, kiel, ke) kaj estas ankaŭ aliaj eraroj. Tio ne malhelpas, ke oni ellernu el la libro la uzadon de prepozicioj, afiksoj, tabelvortoj, dato, tempo (9 variantoj por la kvara kaj duono p. 61.) ktp., tamen...

Szilágyi mencias, ke "amikoj Kalocsay kaj Halka ne trovis gravajn mankojn aŭ erarojn en ĝi, kiam ili komisie de "Literatura Mondo" la manuskripton antaŭ presado trarigardis." Tamen restis kelkaj malgravaj tajperaroj. Unu el la fontoj de Szilvási estas *Rendszeres esperantó nyelvtan* (Sistema Esperanta gramatiko) de Kalocsay. Nun ni ne havas tiel aŭtoritan personon en nia movado en Hungario, kiel li estis, tamen ankaŭ Szilvási povus trovi iun por tralegi la manuskripton, tiam ankaŭ lia libro iĝus vere bona propagandilo de nia lingvo.

Péter Murányi

### 35a ILEI-Konferenco, Lovran, Kroatio 28/07 – 04/08/01

*Dialogo al plifortigo de Esperanto-instruado kaj Interkultura edukado*

#### Kompletigaj informoj

Jam priskribinte en la antaŭaj numeroj de IPR ĝeneralan programon de la konferenco kaj priskribon de la bela regiono, kiu nin atendas, mi volas aldoni nur kelkajn atentigojn por trankviligi hezitemulojn kaj inspiri ĉiun.

28/07: La plejmulto ekveturos aŭtobuse de la kongresejo en Zagrebo je 13h00 post la fermo de UK. Informiĝu ĉe ILEI-budo pri la preciza renkontloko. Ni tagmanĝos survoje post 40-minuta veturado. Post la tagmanĝo nin atendas bela pejzaĝo. Ĝis la 19-a horo ni alvenos al Lovran apud Rijeka, kie nin atendos vespermanĝo en la hotelo. Vi notu, ke la veturado estos pli longa ol menciita en IPR 4/00, sed ĝuindas turisma travagado.



Gajaj estraranoj, Boo Mee kaj Jenny (de dekstre) en Kvinpetalo



## Ĉef-prelegantoj de la konferenco en Lovran:

- Mauro la Torre, prezidanto de ILEI: *Projekto Interkulturo*
- Stefan MacGill, vic-prezidanto de ILEI – *Porinstruista trejnado/ekzamenado*
- Ronald Glossop- emerita prof. de filozofio ĉe universitato de suda Illinois: *Pri nova Epoko*
- Johano Negrete – emerita prof-o de filozofio ĉe universitato de Karakas: *Instruado de Esperanto: Venezuela sperto*
- Radojica Petroviĉ – reprezentanto de ILEI en Jugoslavio: *Pri la bezono(re)difini instruplanojn kaj programojn de Esperanto por diversaj formoj kaj niveloj de instruado*
- Ton Verwoerd – emerita instruisto: *Taŭgaj ludoj por gelernantoj*

## Cseh-Seminario 'C'

Atilio Orellana Rojas gvidos la seminarion por instruistoj kiuj jam sukcese trapasis Cseh-seminariojn 'A' kaj 'B' (ekzamena sesio de 'B' seminario okazos eble dum Interkona Vespero). Por 'C' seminario okazos kvar sesioj po du horoj kaj vendredon unu sesio po 3 horoj.

Krom labori, estas enplanita tempo ankaŭ por malstreĉiĝi, baniĝi, ekskursi kaj plej grave – por babilo. Ni esperas vidi ĉiujn legantojn dum la konferenco kaj se tempo permesos, ni aranĝu interŝanĝon ankaŭ kun italaj instruistoj ĉe la itala kongreso sulĉe proksima en Trieste.

04/08: Disiĝo ĝis Brazilo. Kunportante lunĉ-pakaĵon, oni povos facile veturi aŭtobuse al la proksimaj flughavenoj de Pula (IIR) aŭ Trieste (IT) aŭ ree al Zagrebo.

*Jennifer Bishop,  
kunordigantino de la programo*


## Ekskurso-tago dum la Konferenco

*tra "Magia tero" – Istrio*

Dum la tuttaga ekskurso ni vojaĝos tra la nordadriatika duon-insulo, kiu kunfandiĝas kun nia konferenca golfo kaj tiel formas kun ĝi unu geografian tuton, konatan kiel Istrio kaj Kvarnero. Ni travojaĝos la kor-

forman duoninsulon diagonale tra ĝia interno, laŭiros mezan parton de ĝia okcidenta marbordo kaj revenos tra la pli norda vojo. Tiel ni vizitos kelkajn el la plej belaj, interesaj kaj nekutimaj lokoj de ĉiam surpriziga "Magia Tero".

Baldaŭ post la ekveturo el Lovran [vd. dekstre] ni trapasos la tunelon sub verda monto Uĉka/Monte Maggiore, simbolo de Istrio, kiu ankaŭ donos la freŝecon al nia marborda somero, kaj atingos urbon Pazin / Pisino. Dum la lastaj jaroj ĝi kreas sian imagon kiel urbo de Jules Verne, dank' al la sindona agado de la samnoma klubo, kies membroj esploras la verkon kaj la vivon de tiu futurema verkisto kun eksterordinara personeco. La klubo estas unu el kvar en la tuta mondo kaj nura kiu troviĝas en urbo, kiu iel rilatas al la fama verkisto. Nome, dum la paŭzeto, kiun ni faros tie, eblos vidi la kastelon en kiu estis arestita lia



rolulo Mathias Sandorf kaj kiu troviĝas super profunda abismo tra kiu la ribelulo eskapis. Laŭ la libro, per subteraj akvoj li flosis ĝis urbo Rovinj. Ankaŭ ni daŭrigos nian vojaĝon al tiu urbo, sed pli komforte kaj malpli aventure. Sidante en la buso, de la koro de Istrio ni atingos la marbordan perlon – laŭ nia propra aventuremulo, Tibor Sekelj – unu el la plej belaj anguloj de la mondo. Tia mond-vojaĝanto ne povas multe erari, rimarkis alia nia veterano, somera "indiĝeno" de Rovinj, s-ino Zlata Flego (la sekretarino de la iama Internacia Esperanta Teatro kiu ankaŭ tie, sub la gvido de ŝia frato, aktoro Srdjan Flego, havis siajn laborajn kunvenojn).

Sur la pinto de la rovinja duoninsulo ni vizitos la preĝejon de Sankta Eufemia, la protektantino de la urbo. De tie ni ankaŭ admiras la tutan insularon kiu etendiĝas ĉirkaŭ la urbo. Ni malsupreniros piede tra fama galerio-strato: Via Grisia. La scivolemuloj povos ankoraŭ iom memstare




vagi tra la mediteraneaj stratetoj de la pitoreska urbo kaj la ripozemuloj, el iu el multaj kafejoj ĝui la maretoson kaj belan rigardon al barkplena haveneto kaj najbara insuleto Katarina.

La horloĝoj kaj la suno rememorigos nin pri la tagmanĝo kaj iom pli granda paŭzo. La ombbron kaj freŝecon ni trovos en la ne malproksima natura Parko de Kanalo de Lim, ne facile klarigebla natura fenomeno. Nomata ankaŭ fjrdo, ĝi tute dece rolis kiel scenejo en filmo pri vikingoj, kun mondfama aktoro Kirk Douglas. Tie ni malfermos niajn manĝsaketojn, piknikos, festos kaj siestos! La frandemuloj povos plifortigi sian ekskursan lumĉon per la maraj bongustaĵoj, en la loko kie ostroj kaj konkoj estas bredataj de tempoj de antikvaj Romianoj! La aventuremuloj povos fari ankaŭ etan krozadon per vikingeca ŝipeto.


Post la bona siesto, digesto kaj ripozo, ni pluveturos apud la kanalo kaj la marbordo, pasante apud Vrsar/Orsera, kiu havis alian faman vizitanton, kiu plej multe preferis la am-aventurojn - Giacomo Casanova! Dum modernaj jardekoj la urbeto famas pro ampleksaj naturismaj kampadejoj kaj plaĝoj. Nura koincido, ĉar Istrijo ankaŭ en tia turismo pioniris kaj plenas je lokoj por flegantoj de liberkorpa kulturo.

Post mallonga vojaĝo ni elbusiĝos en urbo Poreĉ/Parenzo [vd. sube], plurfoja ĉampiono de kroata turismo. Tie troviĝas alia perlo, ne nur ĝia aŭ



istria, sed monda: baziliko de Sankta Eufrazio, el 6-a jarcento, proklamita kiel monda heredaĵo. Post tiu vizito, komuna kaj libera promenoj tra negranda sed tre plaĉa urbo, rekomendinda refreŝiĝo en iu bona glaciaĵejo (tie la normojn pri glaciaĵo diktas la najbara glaciaĵo-ĉampiono Italio kaj ĝiaj glaciaĵemaj turistoj) ni direktiĝos al la lasta ekskursocelo.

Forlasante la marbordon kaj ebenaĵon, tra monteta regiono ni atingos la urbeton, kiun oni ne trafas hazarde! En la istria perlo-ĉeno ĝi apartenas al la pli kaŝitaj ĉeneroj, samkiel ekz. la preĝejo en Beram kun la freskoj de Sankta Vincento el Kastav, kiel forlasita Zavrŝje / Piemonte, kiel la plej malgranda urbo de la mondo (Hum)... Grojnjan /Grisignana- urbo de artistoj!



Tia bela sorto ĝin atingis dank' al lastaj amaraj okazaĵoj, kiuj en Istrijo ne mankis dum tuta ĝia historio. (Eble tial Istrijo estas tiel bela, trankviliga kaj rafinita?!) La ekzodoj post la dua mondmilito, perfortaj kaj libervolaj, politikaj kaj ekonomiaj, redezertiĝis Istrijon preskaŭ tiom kiom oftaj vizitoj de pesto; hodiaŭ ĝi havas nur ĉirkaŭ 200.000 enloĝantojn.

Do, antaŭ 40 jaroj, Grojnjan estis ankaŭ bonŝanca: por savi la urbeton de la kompleta forlaso kaj kadukiĝo, la aŭtoritatoj decidis donaci ĝin al artistoj! Tiuj ĉi unue devis mem fizike labori, por prepari la kondiĉojn por entute povi marŝi tra la urbo, ĉar la sovaĝaj kreskaĵoj kreskis ankaŭ interne de iuj forlasitaj domoj. Iom post iom, la urbeto reaperis, la artistoj ekloĝis tie, instalas la atelierojn kaj galeriojn, redonis la animon al la urbo.

En postaj jardekoj en Grojnjan fondiĝis ankaŭ Kultura Centro de Monda Federacio de Muzika Junularo, tiel ke ĉiusomere pilgrimas al ĝi junaj muzikistoj, por spertiĝi sub la gvido de famaj muzikaj pedagogoj el diversaj mondopartoj.

"Vintre" Grojnjan havas ĉirkaŭ 100 loĝantojn kiuj kutime parolas itale; en tuta ĝia komunumo estas ĉirkaŭ 1000 loĝantoj en 100 vilaĝoj kaj frakcioj! Somere la loĝantoj ekparolas ankaŭ kroate kaj vizitantoj – "ĉiulingve" (en la artistaj kursoj ĉefe angle). Ankaŭ somere ĝi pri-sorĉas per sia trankvilo kaj, kvankam la tutan urbeton eblas ĉirkaŭiri dum kelkaj



minutoj, ĝi havas multajn vizitantojn kiuj revenas al ĝi ĉiusomere. Do, kiam la sablo el nia ekskurstaga klepsidro elverŝiĝos, ni devos forlasi vesperan trankvilan viglon kaj muzikajn sonojn de la stratoj de Grojnjan, unikajojn kaj kuriozaĵojn en pluraj ĝiaj galerioj, freŝecon de la teraso antaŭ restoracio "Ladonja", bonajn vinojn, odorojn de trufoj...

Reatinginte la ĉefvojon, en krepusko prezentiĝos al ni, vidalvide de Grojnjan, sur pli granda monto la muroj de pli impona mezepoka urbo – Motovun / Montona. Ankaŭ ĝian famon nun plifortigas la arto! Antaŭ nur kelkaj jaroj, iniciate de reĝisoro Rajko Grliĉ (kies kvalito ne konatas nur en eksjugoslavaj teritorioj) en Motovun startis alternativa filmfestivalo, kiu unue prezentis la filmojn de junaj kaj novaj artistoj, preparitaj ĝuste en la Filma akademio kiun Grliĉ fondis en Grojnjan. La festivalo tuj havis sukceson kaj Motovun eksieĝis filmŝatantoj kaj gravaj filmistoj el multaj landoj.

Sed, ĉi-foje Motovun ni ne povos viziti. Por ĝi ĝuste estos la unua festivala tago... kaj ni devos trankvile forlasi la valon de kvietaj riveretoj Mirna /Quieto (se ni estus en mezepoko ni jam estus riskantaj trafi la feran ĉenon kiu tiam estis stariganta antaŭnokte, ĉe la natura pordo de la valo).

Dum la tago estingiĝos kaj viaj gamboj malstreĉiĝos en la komforto de nia vojaĝanta domo, ni pasos apud aliaj surmontaj urbetoj. Unua estos Buzet/Pingvente. Ne, ne ekscitiĝu, la pingvenoj ne loĝas tie... jes, bonas ĝia biero "Favorita", sed vi lacos kaj dormemos ankaŭ sen biero... Eble vi eĉ ne rimarkos grandan ŝtonan literon S (slovo - litero, vorto, nocio, komenco...) en malnova kroata skribo: glagoljica, kiu montras la vojon al "Aleo de glagoljica" kaj al urbo Hum; urbeton Roĉ kaj vi ne plu aŭdos la klarigojn de la ĉiĉerono pri ĝiaj akordionoj, pri la istria kvintona muzika skalo... eble vi nur subite ekvidos nian hotelon "Bristol" en Lovran kaj diros: Ah, ĉu estis sonĝo?!

Jes, Istrio estas sonĝo!

Eksonĝu kaj ekveturu!

*Viŝnja Brankoviĉ  
organizanto de la konferenco*

## **Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA en 2000**

En la jaro 2000 okazis 8 ekzamensesioj en 4 kontinentoj, po unu en Ukrainio, Usono, Malagasio, Israelo (UK), Bulgario, Koreio, Hispanio (Katalunio), kaj Togolando. Entute sukcesis 30 homoj (15 E, 15 M) el 15 landoj: po 5 el Francio kaj Togolando, po 3 el Hispanio kaj Ukrainio, po 2 el Japanio, Koreio, kaj Usono, kaj po 1 el Aŭstralio, Britio, Bulgario, Malagasio, Nederlando, Niĝerio, Ruslando, kaj Sudafriko. El tiuj kiuj sukcesis en la antaŭtesto, malsukcesis 10 (do 25%) en la ekzamenoj mem (5 E, 5 M).

La plej granda kvanto da sukcesoj (7) okazis en Blanes, Katalunio. En Tseviĉ, Togolando, prezentis sin 21 kandidatoj, tamen sukcesis nur 6, same kiel en Jalto, Ukrainio. Iom nekutime, ekzameniĝis nur 2 homoj kadre de UK en Telavivo.

*Bill Maxey  
Sekretario, IEK*

## **Juna Amiko**

1999 esti rekorda jaro por Juna amiko, kun 1936 abonoj, el kiuj pli ol 1100 venis el Brazilo, per grupa mendo de Brazila Esperanto-Ligo. La pagitaj abonoj por 2000 sumis iomete super mil: en Brazilo (412), Hungario (52), Kroatio (50), Italio (49), Francio (42), Usono (39), Nederlando (29), Svedio (23), Litovio (20), Germanio (18), Finnlando (16). Ekde 2000, BEL devis moderigi sian mendemon, pagante por livero nur por tiuj, kiuj membras en BEL pli ol unu jaron. Per tio, la nombro da brazilaj abonantoj falis al proks. 600 en la jaro 2000, kaj ĝis nun, al 412 en 2001.

Tiu eksterordinara nombro da novaj membroj fontas el aparta varb-strategio, eble kopiinda alilande. BEL fiksas tre avantaĝan membro-kotizon por la novuloj – malpli ol la duono de la plena kotizo. Tiel facilas logi varbitojn kaj komenc-kursulojn al ilia nacia ligo. Tamen el tiu modesta sumo, ne eblis kovri la kostojn de dua revuo "Juna amiko", bedaŭrinde, ĉar ĝuste ĝi plej utilas por la komencintoj.

Restas la fakto, ke la bonfarto de la revuo dependas grandparte de la aparta larĝvido kaj mendemo de la brazilanoj.



Dum iom da tempo, tio ebligis al ni ne vidigi tendencon kiu ekzistas jam de kelkaj jaroj, la nombro da abonantoj precipe en la plentarifaj landoj iom post iom falas. Tio okazas spite al la daŭra enhava kvalito, kaj la subita levo de la aspekta kvalito veninte el la plenkoloraj kovriloj. Tiu falado paralelas ĉiam malpli da atento al la varbado kaj subteno de perantoj. Probable tio estas la ĉefa kaŭzo de la faletado. La kvanto da varbado kaj administrado necesa por la revuo estas pli ol la nuna prizorganto povas dediĉi. Tial la alvokoj en la lastaj numeroj de IPR. Post dek ses jaroj da plenumo en samaj manoj, venis la tempo transdoni tiujn taskojn en novajn kaj espereble pli multajn manojn. Tio nasku freŝajn ideojn, strategiojn kaj procedurojn kiel pli kontentige mastrumi la revuon.

Efektive, ni ricevis du interesiĝantojn; ILEI invitos ilin al Budapeŝto junio, okaze de la ekspedo de la dua numero de JA, por konatiĝi kun la taskoj kaj la situacio. Se tiuj akceptos la taskojn, ni povos havi adiminstranton/ ekspediston apud Budapeŝto kaj ret-konektitan varbulon en najbara lando. Ni esperu je tiuj solvoj kaj refoja prospero por nia baldaŭ cent-numera revuo.

*Stefan MacGill*  
administranto, JA

## LIBROSERVO en 2000

La libroservo de ILEI pretigis nur 16 fakturojn en 2001, kun suma valoro de 503,10 EUR, el kiuj 453,30 EUR rilatis al libroj.

Estis fakturitaj precize cent libroj (Okulo 38, Tendaraj tagoj 50, Szanser 2, Rommesmo 4, Pasporto 2, Melnikov 4).

La nova libro de Menikov estis vendita rekte al UEA, sen aparta fakturo.

Restas granda stoko de Okulo, kreita pro la atenditaj bezonoj de la klasoj de Interkulturo, sed tiu principa bezono ne konkretiĝis en la formo de mendoj.

Rekomendate estas deskribi ĉiujn krom 100 ekzempleroj de la kantlibro Rommesmo.

La klopodo starigi filion de la libroservo en okcidenta Eŭropo ne naskis frukton; ni daŭre serĉas alian transprenanton.

*Stefan MacGill*  
(kontraŭvola) prizorganto

## Financa Raporto de ILEI 2000

### Rezulto

2000.12.31

Rimedo	EUR	Kostoj	EUR
Membrokotizoj	5,930:00	IPR '00	5,464:00
Konferenco	1,527:00	IPR '99	1,040:00
Libroj	1,006:00	Afranko, tel,reto	1,419:00
Subvencio '99/00	2,711:00	Materialoj	1,100:00
Donacoj	510:00	Estrarkostoj	1,390:00
		Komerca ĉambro	21:00
Interzetoj	751:00	Faka kotizo	144:00
		Ekzameno	66:00
		Bankkostoj	1,198:00
		Diversaj	593:00
<b>Sumo (EUR)</b>	<b>12,435:00</b>	<b>Sumo</b>	<b>12,435:00</b>

### Bilanco

2000.12.31

Aktivo		Pasivo	
Kaso	- 40:00	Interkulturo	1,957:00
Bankoj		FEL	145:00
(SEB, FSB, PG)	2,177:00	Div. kreditoroj	5,260:00
UEA, ilek-a	9,700:00		
JA, juna-l	1,439:00	Propra kapitalo	8,384:00
Oficejaj iloj	165:00		
Nepagitaj fakturoj	145:00		
Stoko Eldono	336:00		
Stoko Libroj	1,824:00		
<b>Sumo (EUR)</b>	<b>15,746:00</b>	<b>Sumo</b>	<b>15,746:00</b>

### Ekzameno 2000

Saldo 1999.1231 - 26:00 EUR

Ekzamen-kotizoj 205:32

Ekzamen-kostoj - 245:41

Saldo 2000.12.31 - 66:09 EUR



## Interkulturo 2000

Saldo 1999.12.31. 257 EUR

<u>Enspezoj</u>		<u>Kostoj</u>	
Privataj donacoj	735:77	Administrado	- 117:00
Fondusoj, grupoj	2650:00	Ekspedo Eurokalendaro	- 44:00
		Helpo INTK-infanoj	- 198:00
		Varbiloj	- 228:37
		Lernokajero	- 266:58
		Cirkuleroj	- 467:00*
		Sendo lernomaterialoj	
		al B, C klasoj	- 1490:62*
		Funkciigo Virtuala Lernejo	- 540:00
		Saldo 2000.12.31	291:20

Sumo 3642:77 Sumo 3642:77

\* Al Bilanco Pasivo

## IPR 2000

Presado '99 resto	1039:69
Presado '00	3627:64
Afranko	1328:21
Honorario	508:00
Sumo	6503:54 EUR (Por 2000: 5464 EUR)

## Juna Amiko 2000

Rezulto(EUR)

<u>Rimedo</u>		<u>Kostoj</u>	
Abonoj 2000	5,291:00	Presado '00	2,744:00
Prunto de ilek-a	3,131:00	(inkl. bankkostojn)	
		TNT ekspedoj	1,626:00
		Honorarioj	549:00
		Materialoj k.a.	1,119:00
		Kostokalkulo	945:00
		Saldo	1,439:00
Sumo	8,422:00	Sumo	8,422:00

## Fonduso Erika Linz

Saldo 1999.12.31 140,333:00 SEK

Donacoj	544:50
Loterio por kolekto	1450:00
Interezo	6300:10
Stipendio	- 5040:00
Stipendio	- 2170:00
Bankkosto	-50:00

Saldo 2000.12.31 141,367:00 SEK

## Fonduso Szerdahelyi

Saldo 1999.12.31 7170:00 SEK

Donaco	200:00
Vendoj	8,405:00
Interezo	86:60
Antaŭpago, eldono parte	- 1720:00

Saldo 2000.12.31 14,141:60 SEK

## Fonduso Dazzini

Saldo 1999.12.31 6325:00 SEK

Interzetoj	23:92
Donacoj '99	91:76
Donacoj '00	501:00

Membrigoj/helpoj - 2185:64

Saldo 2000.12.31 4755:58 SEK

## Koleghelpa kaso

Saldo 1999.12.31 1126:00 SEK

Kolektoj, donacoj	1576:00
Koleghelpo	- 946:00

Saldo 2000.12.31 1756:00 SEK

## Financa Plano 2001

<u>Rimedo</u>	<u>EUR</u>	<u>Kostoj</u>	<u>EUR</u>
Membrotizoj	6,500:00	IPR	5,600:00
Konferenco	1,500:00	Afranko, tel, fakso ktp.	1,500:00
Libroj	1,000:00	Estrarkostoj	1,600:00
Eldonaĵoj	600:00	Materialo, kopiado	1,200:00
Subvencio UEA	1,300:00	Oficejaj iloj	500:00
Interzetoj	500:00	Faka kotizo, komerca ĉambro	200:00
Juna Amiko	700:00	Interkulturo	1,000:00
Diversaĵoj	500:00	Diversaĵoj	1,000:00
(donacoj kaj aliaj)		(ekzameno, donacoj, bankkostoj ktp)	
Sumo	12,600:00	Sumo	12,600:00

Boo Mee Kim-Lindblom, Kasisto de ILEI



## Lingvaj studvojaĝoj, staĝoj por komencantoj kaj komencintoj

Internacia Kunordiga Centro „Viviga Vojaĝo” organizas diversajn lingvajn staĝojn kaj studvojaĝojn tutmonde, dum la tuta jaro. Bonvenaj estas ĉiuj, kiuj deziras eklerni la Internacian Lingvon, progresi, lertiĝi en la konversacio kaj enprofundiĝi en la literaturo aŭ en alia temo.

La gepatra lingvo de tutkomencantoj povas esti iu ajn lingvo, ĉar la instruado disvolviĝas laŭ rekta metodo sen tradukoj.

Laŭ deziro ni organizas staĝojn kun fakaj kaj etno-kulturaj programoj por diversaj grupoj kaj socioj. Ankaŭ unuopuloj estas bonvenaj en vojaĝoj al feriadoj, kongresoj, konferencoj kaj aliaj aranĝoj tutmonde.

Jen proponoj el niaj programoj en Hungario, regiono de la lago Tisza:

– Esperanto-kurso en Tiszafüred:

niveletoj: komencantoj kaj ekparolantoj,

ejo: loka gimnazio kaj ekskursejoj

– La Lago Tisza kaj ties regiono:

rondvojaĝo de 7 tagoj – 6 noktoj kun plena prizorgado

Venontaj kurs-komencoj: 2001 majo 5, 12, 19, 26, junio 2, 9, 16, 23, 30, julio 7, 14, 21, 28, aŭgusto 4, 11, 18, 25, septembro 1, 8, 15, 22, 29 ...

Petu detalajn informojn aŭ aliĝu indikante la deziratan programon:

Internacia Kunordiga Centro: Viviga Vojaĝo, Chemin de la Motte 22,

CH-1018 Lausanne, Svislando

[ethno-culture@worldonline.ch](mailto:ethno-culture@worldonline.ch)

<http://www.esperanto.ch/etno-kulturo>

<http://members.worldonline.ch/ethno-culture>

## REDAKCIAJ INFORMOJ

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): R. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende. **Presado:** Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Tel: +32-3-234 34 00.

**Redaktejo:** NÉMETH József, HU-8531 IIIÁSZ, Fő u. 41/5. Rete: [jozsefo@nl-papa.hu](mailto:jozsefo@nl-papa.hu); [jozsefo\\_nemeth@hotmail.com](mailto:jozsefo_nemeth@hotmail.com), tel: +36-89/ 356-050. Laboreja fakso (ĝi funkcias nur en lernotagoj, antaŭtagmeze): +36-89/ 324-896).

La nunan numeron ni sendis al la presejo la 2-an de majo, redaktfino por la sekva numero: la 30-a de aŭgusto 2001.

## LABORKOMISIONOJ

**Ekzamena:** Duncan Charters (prezidanto), Bill Maxey (sekretario)

**Elekta:** Gwenda Sutton (kunvokanto), Maritza Gutierrez, Joseph Catil

**Kontrola:** Bertil Andreasson, Lars Forsman, Bo Sandelin

**Lerneja:** Marija Belošević, Jennifer Bishop, Renato Corsetti, Stefan MacGill, Géza Kurucz, Mauro La Torre, Raita Pyhälä

**Regulara:** Rob Moerbeek, Hans ten Hagen

**Terminara:** Mauro La Torre

## KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

**IEI:** Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando

**UEA:** Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

**UNESKO** (en operaciaj rilatoj). Reprezentanto de IEI: François Lo Jacomo, 42 quai de la Loire, FR-75019 Paris, Francio

## MEMBRIĜO AL IEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

IEI estas jure registrita ĉe la komerca ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.

La membreco inkluzivas ricevon de 4 numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia IEI, skribu al la kasisto: Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockens gata 102, SE-136 62 Haninge; tel. (+46 8) 777 4175, <[boomee.kimlindblom@swipnet.se](mailto:boomee.kimlindblom@swipnet.se)>, postĝirkonto: 682117-7 Stokholmo, S.W.I.F.T. - kodo: PGSISESS.

Membro-kotizoj: A-landoj (laŭ UEA-divido): 14 EUR, B-landoj: 8 EUR. Simpla abono sen membreco: 18 EUR.

Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA: UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago. Kontoj ĉe UEA: ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko) kaj pike-b (Projekto Interkulturo). Detala listigo de pagmanieroj al UEA aperas sur p. 37 de Jarlibro 1999. Prefere informu senpere la kasiston de IEI pri la enpago.

**Reklamtarifoj por IPR:** 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

## Interreto

<http://lps.uniroma3.it/ilei> Bazaj informoj pri IEI kun ligoj al aliaj paĝoj

<http://lps.uniroma3.it/eins> La diskutejo E-INS pri Esperanto-instruado

<http://lps.uniroma3.it/eler> Tabelo de Esperanto en lernejoj (E-LERnejoj)

<http://lps.uniroma3.it/kler> Kvazaŭlernejo "Tibor Sekelj" por la Projekto Interkulturo.

<http://esperanto.nu/ileibulteno/index.html> IEI-Bulteno

[www.banvai-kkt.sulinet.hu/esperanto](http://www.banvai-kkt.sulinet.hu/esperanto) Juna Amiko

[www.hungary.net/esperanto/tend-tag.htm](http://www.hungary.net/esperanto/tend-tag.htm) Tendaraj Tagoj (angla priskribo)

[www.nl-papa.hu/ipr/](http://www.nl-papa.hu/ipr/) Internacia Pedagogia Revuo



## SEKCIESTROJ de ILEI

**Albanio:** Bardhyl Selimi,  
Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3,  
AL-Tirana

**Argentino:** Teresita Alaniz,  
El Ombá s/n, AR-5801 Alpa  
Corral

**Aŭstralio:** Kay Andersen,  
P.O. Box 186,  
Moorooka AU-4105

✉: [kjand@ozemail.com.au](mailto:kjand@ozemail.com.au)

**Belgio:** Raymond Wylleman,  
A. Vermeylenstr. 65, BE-8400  
Oostende

**Brazilo:** Elvira Fontes, Rua  
Machado de Assis 243, ap. 11,  
BR-04106-010 Sao Paulo (SP)

**Britio:** Malcolm Jones,  
1 Regent Avenue, Skipton, GB-  
North Yorkshire BD23 1AZ

**Ĉeĥio:** Jana Melichárková,  
CZ-696 02 Ratiškovice 938  
✉: [mmelicharek@iol.cz](mailto:mmelicharek@iol.cz)

**Ĉinio:** Zhang Danchen,  
General Foreign Languages  
Dept., 29-34 North Part,  
Huazhong Normal University,  
CN-430070 Wuhan

✉: [zdchen@public.wh.hb.cn](mailto:zdchen@public.wh.hb.cn)

**Finnlando:** Carola Antskog,  
Dragsfjärdvägen 690,  
FI-25700 Kimito

✉: [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi)

**Francio:** Joseph Catil,  
5, rue des Calabres,  
FR-69330 Meyzieux,

✉: [joseph.catil@wanadoo.fr](mailto:joseph.catil@wanadoo.fr)

**Germanio:** Michael J.  
Scherer, Von Thürheimstr. 47,  
DE-89264 Weissenhorn

**Hungario:** József Németh,  
Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász  
✉: [jozefo@nl-papa.hu](mailto:jozefo@nl-papa.hu)

**Irano:** Hamzeh Šafii, P.O.  
kesto 17765-184, IR-Teheran  
✉: [ilei.ir@esperanto.org](mailto:ilei.ir@esperanto.org)

**Italio:** Luigia Oberrauch  
Madella, via Prampolini 8,  
IT-43100 Parma

✉: [vmadella@tin.it](mailto:vmadella@tin.it)

**Japanio:** Masumi Suzuki,  
Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi,  
Tokio, JP-181-0001

**Katalunio:** Luz Vázquez,  
Apartat 553, ES-43200 Reus  
✉: [ilei-cat@esperanto.nu](mailto:ilei-cat@esperanto.nu)

**Kroatio:** Ivan Bekavac-Basić,  
Kušlanova 59,  
HR-10000 Zagreb

**Kubo:** H. Jiminéz, Apartado  
5120, CU-10500 Ciudad de la  
Habana

✉: [kubesp@ip.etcvsa.cu](mailto:kubesp@ip.etcvsa.cu)

**Nederlando:** Atilio Orellana  
Rojas, Rouwstraat 172,  
NL-2585 HW Den Haag,

✉: [iei001@worldonline.nl](mailto:iei001@worldonline.nl)

**Norvegio:** Björn Thuv,  
I.F. Gjerdrums vei 33  
NO-1396 Billingstad

✉: [bthuv@c2i.net](mailto:bthuv@c2i.net)

**Pollando:** Maria Majerczak,  
ul. Armii Krajowej 7, m. 122,  
PL-30 150 Krakow, ☎: (+48  
12) 638 14 49

**Rumanio:** Prof. Popa Florica,  
Str. Eroilor 29, ap.7,  
RO-1900 Timisoara

**Rusio:** Irina Gončarova,  
Moloeznaja 38-10, Odincovo 2,  
Mosk. obl. RU-143000  
✉: [mirina@online.ru](mailto:mirina@online.ru)

**Svedio:** Bertil Andreasson,  
Södra Rörum pl. 455, SE-24294  
Hörby ✉: [bertil.andreasson@horby.mail.telia.com](mailto:bertil.andreasson@horby.mail.telia.com)

**Svislando:** François Randin,  
Str. Vallombreuse 14,  
CH-1004 Lausanne

✉: [ilei.ch@esperanto.nu](mailto:ilei.ch@esperanto.nu)

**Togolando:** Attiogbe-  
Agbemadon B., Mensah, T. I. E.  
To, B.P. 13169, Lome-TOGO,

✉: [esp.togo@cafe.tg](mailto:esp.togo@cafe.tg)

**Usono:** Doroteo Holland,  
5140 San Lorenzo Dr. Santa  
Barbara, CA 93111-2521 (US)  
✉: [72644.2450@compuserve.com](mailto:72644.2450@compuserve.com)

**Ukrainio:** Nina Daniljuk,  
prospekt Sobornosti, 32-108,  
Luck-26, UA-43026

**Uzbekistano:** Eugeno S.  
Perevertajlo, Ab. kesto 140, UZ-  
700000 Taškent, CIS  
✉: [eugeny@esper.gimli.com](mailto:eugeny@esper.gimli.com)

**Venezuelo:** Prof. J.E.  
Bachrich, Apartado VE-70782,  
Caracas 1071 A

**Armenio:** Lida Elbakjan,  
Moldovakan 26/2, kv. 52,  
AM-375062 Erevan

**Bosnio kaj Hercegovino:**  
Nimeta Kulenovič, Branica  
Sarajeva 15/V, BA-71000  
Sarajevo

**Ĉilio:** Héctor Campos Grez,  
Casilla 231, Curicó. CL-Séptima  
Región ✉: [strigo@ctcreuna.cl](mailto:strigo@ctcreuna.cl)

**Danio:** vakas  
**Estonio:** Helgi Hromova,  
Pk. 94, EE-3053 Keila

**Islando:** Loftur Melberg,  
Skolabraut 1,  
IS-220 Hafnarfjörður

**Israelo:** Murjan Josef,  
P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv

**Jugoslavio:** Radojica  
Petrovič, Bul. Oslobodjenja 36,  
YU-32000 Čačak  
✉: [radp@emi.yu](mailto:radp@emi.yu)

**Kongo:** Ngangu Nduantoni-  
Bakidila,  
B.P. 13, CG-Lukala (Bas-Zaire)

**Kostariko:** Hugo Mora  
Poltironieri, Apartado 4981,  
CR-1000 San José

✉: [miaumiaul@racsa.co.cr](mailto:miaumiaul@racsa.co.cr)

**Koreio:** So Jin Su, Dept. de  
Ekonomiko, Universitato Kang-  
nam, Kugali Kihung-up, Yon-  
gin-gun, Kyonggi-do KR-499-  
900 ✉: [so@kns.kangnam.ac.kr](mailto:so@kns.kangnam.ac.kr)

**Litovio:** Algimantas  
Piliponis, Karolinisiu 3-93,  
LT-2044 Vilnius

**Nov-Zelando:** Gwenda Sut-  
ton, 12C Herbert Gardens, 186  
The Terrace, NZ-Wellington 1

✉: [gwenda.s@ihug.co.nz](mailto:gwenda.s@ihug.co.nz)

**Portugallio:** João Jose Santos  
Rua da Escola, lote 57 - r/e esq  
Vale Grande, PT-1675 Pontinha

**Slovenio:** Marija Zlatnar-  
Moe, Miličinskoga 66, SI-1000  
Ljubljana.

✉: [Marija.Zlatnar@guest.arnes.si](mailto:Marija.Zlatnar@guest.arnes.si)

**Ukrainio:** Nina Daniljuk,  
prospekt Sobornosti, 32-108,  
Luck-26, UA-43026

**Uzbekistano:** Eugeno S.  
Perevertajlo, Ab. kesto 140, UZ-  
700000 Taškent, CIS

✉: [eugeny@esper.gimli.com](mailto:eugeny@esper.gimli.com)

**Venezuelo:** Prof. J.E.  
Bachrich, Apartado VE-70782,  
Caracas 1071 A

